

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia.

La 26-an de aprilo okazis ĉe Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds ceremonio honore al la memoro de d-ro August Braun, kiu subite mortis en Parizo la 19-an de septembro 1985. D-ro August Braun estis unu el la fondintoj de Kultura Centro Esperantista kaj ekde la komenco de la vivo de tiu Centro la 15-an de decembro 1968 ĝis la aŭtuno 1984 li prezidis la Direktan Komitaton, kiu gvidis la konstruon de la Centro kaj de ties Gastejo Edmond Privat. Dum tri elsendoj ni legos al vi tute aŭ parte paroladojn, kiuj estis prezentitaj dum la ceremonio, kiu honoris la mortintan prezidanton. Ili konsciigas pri la bunteco de la personeco de tiu scienculo. Hodiaŭ ni komencos per kontribuaĵo de d-ro Paul Dinichert, kiu estis la direktoro de Svisa Laboratorio pri Horloĝaj Esploroj, kiam d-ro August Braun deĵoris en tiu ĉi neŭsatela universitata fako kiel esploranto kaj instruisto pri metalurgio. Jen ni citas omaĝon al August Braun de d-ro Paul Dinichert.

A.- « *La hodiaŭa manifestacio ne povus pli bone memorigi kaj eĉ demonstri, ke August Braun estis persono prezentanta multnombrajn facetojn. Ĉiuj el ili havis sian propran brilon, sed la fajroj, kiujn radiis ĉiu aparte, ne multe interferis unu la alian.*

Cl.- *August Braun estis fakte viro deteniĝema, diskreta en tiu senco, ke li povis pasie diserti kun iu el siaj samranguloj en kiu ajn fako, tamen ne malkaŝante al tiu ĉi la multecon de siaj kromaj okupaĵoj, kaj precipe ne aludante pri vasteco de siaj konoj.*

A.- *Necesis al tiu, kiu alparolas vin, tridek jaroj da scienca kunlaborado por malkovri iom post iom, precipe lian amon al muziko - moderna interalie -, lian ŝaton pri naturo - kiom karaj estis por li liaj ĝardeno kaj vinberejo -, lian emon al ia esoterismo. Multaj aliaj aspektoj de nia universo krome kaptis lian intelektan scivolemon ĉiam viglan. Okaze de hazarda renkontiĝo kelkajn tagojn antaŭ sia morto li parolis al mi entuziasme pri olografiaj demonstroj, kiujn li volis ĉeesti en Parizo ; temis pri mirinda foto-tekniko, kiu ebligas restitucii reliefe en la spaco la bildon de objekto.*

Cl.- *Sed antaŭ ĉio mi deziras skizi lian sciencan aktivecon. August Braun studis fizikon en la Politeknika Federala Altlernejo zurika kaj kronis la studojn per doktora tezo en fako tiam ankoraŭ pionira, sed kiu baldaŭ poste ekfloris fulme. Temis pri materioj, kiuj devus ludi rolon en la duonkonduktiloj, tiuj mem, kiuj tuj poste ebligis la tutan teknikon de transistoroj kaj de miniaturizitaj cirkvitoj.*

A.- *Ni hodiaŭ pripensu nur pri la fabela spektaklo, kiun televido prezentis antaŭ nelonge rekte : transiro de la spaca sondilo Giotto tra la kometo de Halley.*

Cl.- *Tamen August Braun sin sentis verŝajne forte altirata de meteorologio. Li laboris tiel dum certa tempo ĉe la aviadstacio de Dübendorf, kiu estis la tiama zurika aviadejo. Sed momentaj cirkonstancoj ne permesis al li daŭrigi profesion aktivecon sur tiu vojo. Laŭdire li sentis pri tio iom kruelan seniluziiĝon.*

A.- *Jen li ĝuste estis vokata de svisa laboratorio pri horloĝaj esploroj ekde 1948, kun la tasko daŭrigi kaj funde elserĉi esplorojn pri metaloj, pli precize en la fako nomita tre signife metalografio. Ni memorigu, ke dum tiuj jaroj la kvarc-horloĝo ekzistis nur embrie, konfuze en la estonteco, pro manko de elektronikaj elementoj sufiĉe etaj kaj konsumante sufiĉe malmulte da elektra energio.*

Cl.- *Oni do vivis ankoraŭ je la erao de mekanika horloĝo konsistanta baze unuflanke je ŝtaloj specialaj kaj tre specifaj, aliflanke je latunoj kaj fine je altvaloraj metaloj por la vestado de tiuj tempogardantoj. Ĉiuj tiuj kunfandaĵoj estis kompreneble ĉiutage uzataj, sed ofte utiligataj empirie. Necesis do lernadi pli bone koni ilian strukturon kaj ties ecojn, por povi utiligi ilin laŭscie.*

A.- *August Braun perfektigis jam ekzistantajn ilojn kaj konceptis novajn kun granda sagaceco.*

Cl.- *Ĉar paralele li asociiĝis al la trejnado de horloĝistoj-inĝenieroj, kiuj studis ĉe la scienc-fakultato de Neuchâtel, li incis preskaŭ tutan generacion da inĝenieroj al tiuj teknikoj. Multaj el liaj lernantoj, eĉ jarojn post eniro en la praktikon, ankoraŭ venis konsulti lin pri problemoj, kontraŭ kiuj ili stumblis.*

A.- *August Braun akiris al si famon trans niaj limoj kaj en diversaj industrioj per siaj esploroj eksperimentaj kaj teoriaj, por kiuj li nutris certan preferon en la fako mezurado kaj signifo pri malmoleco de materioj. Nu tiu fundamenta kvalito devas altiri atenton de ĉiu inĝeniero, kiu volas utiligi plej bone materialon, kiun li uzas. Plie August Braun interesiĝis pri ellaborado de precizaj optikaj metodoj, ebligantaj diferencigi kaj difini la kolorojn tre nuancitajn de lumineskaj materioj, kiujn oni fiksas sur la ciflerplatojn kaj nadiojn.*

Cl.- *Li entreprenis ĉiujn siajn esplorojn kun fajna detalemo kaj konstanta zorgemo pri perfekteco. Tiu bezono de intelekta honesteco manifestiĝis same en liaj skribaj eldonaĵoj kaj raportoj. Li ofte ŝatis ligi en sama frazo, kion li konsideris reale akirita kaj kion li estimis nesufiĉe certa. Al pli pragmata leganto aŭ dialoganto ĉi tiu miksaĵo igis iom malfacila la komprenon de lia grava mesaĝo.*

A.- *Kun mia kolego mi havis pri ĉi tio diskutojn tiom viglajn kiom instruajn ; akreco kaj subtileco de lia rezonado montriĝis plene en tiuj okazoj. Eĉ lia paŝado en la irmaniero rivelis spiriton ĉiam okupatan de ia pensado ; instinkte li fuĝis agresemon de la ĉirkaŭaĵo. Tiu forĵetemo de la neeviteblaj malgravaĵoj de la ĉiutaga vivo eble kondukis lin al ia izoleco. Sed kontraste je momentoj de reciproka konfido lia riĉa personeco montriĝis despli forte. »*

Cl.- *La du venontajn semajnojn ni legos al vi aliajn omaĝojn al la mortinta prezidanto de Kultura Centro Esperantista, August Braun. D-ro Paul Dinichert konkludis sian omaĝon per tiuj ĉi vortoj « Pro tio mi estas persone, kiel liaj malnovaj laborkolegoj, aparte feliĉa, ke tia omaĝo estu donita al li nun en Kultura Centro Esperantista, en tiu esperanto-medio, kiun li tiom ŝatis. »*

Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-